

Novajoj de

Esperanto-USA

Dumonata bulteno • *Bimonthly bulletin* • Vol 47, Nº 3 (2008/3)

Saluton, mondo!



Novbakita esperantistido Danjela Jozefina SCHMIDT kun sia granda fratino Aŭtuno. (vidu p. 9)

Ĉi-numere: Nefiksa membrojaro: aliĝu iam ajn! • Invito al Montreal • Jar-raportoj de la estraro • Tradukdefio: *Tristam Shandy* • AAIE: kiel instruisto traktu erarojn? • Krucenigmoj de niaj membroj • Pri fondusoj de E-USA • "La alilanda konversacio" • Letero-lavango • kaj pli...

Esperanto-USA

Dumonata bulteno • *Bi-monthly bulletin*

Redaktoro • *Editor*: Hoss FIROOZNA

Sendu kontribuojn al • *Send contributions to:*

- ✉ E-USA bulletin, c/o Hoss Firooznia
CPU 271205, University of Rochester
Rochester, NY 14627-1205, USA
- ✉ bulteno@esperanto-usa.org

Redaktofino por la venonta numero • *Editorial
deadline for the upcoming issue:*

la 15-a de Julio 2008

★★★

Ni bonvenigas kontribuojn en aŭ Esperanto aŭ la angla lingvo. Bonvolu inkluzivi viajn plenan nomon, foton kaj (ret)poŝtadreson. Sendante fotojn, nepre informu nin pri la nomoj de kaj la fotinto kaj la fotito(j) kaj la loko kaj dato. Ni ne perpoŝte resendos materialojn, krom se vi inkluzivos mem-adresitan, afrankitan koverton.

Oni rajtas reaperigi materialojn el tiu ĉi bulteno, kondiĉe ke oni ĝuste indiku la fonton kaj sendu al la redakcio ekzempleron de la republikigita materialo. Opinioj esprimitaj ĉi tie apartenas al la aŭtoroj, kaj ne nepre prezentas la vidpunktojn de Esperanto-USA aŭ la redaktoro.

★★★

We welcome contributions in either English or Esperanto. Please include your full name, photo, and email and/or postal address. With photos please include the name of both photographer and subjects, along with location and date. Materials will not be returned by mail unless you include a self-addressed, stamped envelope.

You may reprint content from this bulletin if you give credit and send us a copy of the reprinted material. Opinions expressed here are those of the authors and do not necessarily reflect the views of Esperanto-USA or the editor.

★★★

Centra Oficejo • Central Office of Esperanto-USA

- ✉ PO Box 1129, El Cerrito CA 94530 USA
- ☎ 510.653.0998; 2510.653.1468
- ✉ info@esperanto-usa.org
- http://esperanto-usa.org

Direktoro • Director, CO: William B. HARRIS

Prezidanto • President: Philip G. DORCAS

Vicprezidanto • Vice President: Steven D. BREWER

Sekretario • Secretary: Julie SPICKLER

Kasisto • Treasurer: Anna BENNETT

Aliaj estraranoj • Other board members:

Joel AMIS, Ĵenja AMIS, Trevor ANDREWS, D. Gary GRADY, Anjo HARLOW, Lusi HARMON, Robert L. READ, Tim WESTOVER, Christopher ZERVIC

(Re)aliĝu kiam ajn! • (Re)join whenever you like!

Ĝis nun, membreco en E-USA sekvis la kalendaran jaron: ekzemple, eĉ se oni aliĝis en Julio, decembre oni devus denove realiĝi. Sed ne plu!

Ekde nun, oni rajtas aliĝi aŭ re-aliĝi iam ajn dum la jaro kaj ricevi servojn dum la sekvaj 12 monatoj. Ni esperas, ke lokaj grupoj nun povos pli facile varbi novulojn al E-USA dum la tuta jaro, kaj ne nur dum la tre okupitaj tagoj ĉe jarfino.

Por ekscii, kiam finiĝos via membreco, vidu la adres-etikedon sur via bulteno; en la unua linio vi trovos la monaton kaj jaron (MM/JJ) kiam vi devos realiĝi.

Until now, membership in E-USA followed the calendar year: even if you signed up in July, for example, come December you'd have to renew again. But no longer!

Starting now, you can join or renew at any time during the year and receive a full 12 months of services. We hope this change will make it easier for local groups to sign up new members to E-USA throughout the year, and not just during the very busy days at year's end.

To find out when your membership ends, see the address label on your bulletin; in the first line you'll find the month and year (MM/YY) when you'll need to renew.

Agrablan legadon!



(Re)join Esperanto-USA! Members receive: a bi-monthly newsletter • discounts at our store and at our annual convention • annual *Membership List* • access to the email list *elna-membroj* • member privileges at our website • the satisfaction of promoting Esperanto in the USA! Return this form with payment to: **Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530**

Name: _____

Address: _____

City & State: _____

Postal code & Country: _____

Phone & Fax: _____

E-mail: _____

Birthdate (M/D/Y): ____/____/____ Ham radio call: _____

Don't allow other members to see my: address phone fax email

Send me info on joining the *Universala Esperanto Asocio*

Check **one** category of membership/support:

Life (*birthdate required*)..... \$800.00

Sustaining..... \$80.00

Family..... \$60.00

Individual..... \$40.00

Youth (*you must be under 27*)..... \$20.00

Limited Income..... \$20.00

Friend of Esperanto..... \$10.00

(*not a membership, but you receive 3 issues of the newsletter*)

Credit card info: Visa Mastercard

Number: _____ Expires(M/Y): ____/____

Korektoj de 2008/2

- En *Ŝercu en ĉiu sezono* (p. 9) ial fuŝpresiĝis la japanlingvaj *senrjuoj*. Jen la korektitaj *senrjuoj*:
 1. 痩せるツボ 脂肪が邪魔し 探せない
 2. 「買っていい?」聞く時既に 買ってある
 3. タバコより 体に悪い 妻のグチ
 4. まだ寝てる 帰ってくれば もう寝てる
 5. プロポーズ あの日にかえって ことわりた
- En *Vojaĝoj* (p. 12) la komencdato de NASK estis erara. Ĝi komenciĝos la 30-an de Junio.

Ekzempleroj de Butler-vortaro

Kelkaj esperantistoj lastatempe petis rekomendon pri bonkvalita Esperanto-English vortaro.

Tia vortaro ne plu estas havebla, kaj ŝajne ne estos havebla dum multaj monatoj.

En la CO estas kelkaj brokantaj ekzempleroj de la vortaro de Montague C. BUTLER (Esperanto-English).

Se vi ne nun havas tiun libron, kaj volas aĉeti ekzempleron kontraŭ \$5.00 plus imposto kaj sendokosto, sendu vian peton al la adreso usa@esperanto-usa.org. Post la kongreso, mi vendos la vortarojn al membroj de E-USA. Se mankos sufiĉaj ekzempleroj, mi elektos ricevontojn per lotumado.

—Bill HARRIS

Esperanto + Mensa = Espermenso

Marvin STANLEY estis dum multaj jaroj ne nur la UEA-kontisto, sed ankaŭ la respondeculo por la Speciala Interes-Grupo ("SIG") de Mensa, "Espermenso".

Lia morto lasas Espermenson sen gvidanto, kaj tre eble Roy MCCOY, kiu laboras en la CO de UEA kiel prespreditigisto kaj redaktoro de la Jarlibro, plenumos tiun rolon.

Roy ĵus demandis min pri kiom da mensaanoj estas inter la usona esperantistaro. Mi havas nenian ideon, ĉar ni neniam kolektis tiun informon. Sed por revivigi Espermenson, ni devus scii kiom da, kaj kie troviĝas la mensaanoj inter ni.

Do jen mia peto: Se vi estas nun aŭ iam estis ano de Mensa, bonvolu informi min per mesaĝo al billharmon@esperanto.org. Tiu informo restos tute konfidenca. Elkoran dankon pro via komplezemo!

—William R. HARMON, cefdelegito de UEA, Usono

Don't miss Montreal!

Last year, the *Landa Kongreso* in Tijuana was one of the most international in our history. Those who came saw the United States from a new perspective and the Mexican Esperanto-speakers came away from the congress with a renewed sense of purpose. Their recent congress in Aguas Calientes reflects their commitment to action.



Steven D. BREWER

Steven is Vice-President of Esperanto-USA and webmaster for esperanto-usa.org. He lives in Amherst, MA.

sbrewer@bio.umass.edu

Esperanto in the Americas is experiencing a renaissance: a new office is opening for the *Amerika Komisiono* and there is remarkable activity in many countries throughout the hemisphere. You can be part of the action!

Montreal beckons. One of five largest francophone cities on earth, Montreal is unique in the New World. By hosting the *Landa Kongreso* and *Tut-Amerika Kongreso*, it offers a fascinating cultural experience to Americans from every country in the hemisphere.

Montreal's rich history and diverse culture are evident everywhere. The city has dozens of historic neighborhoods, each with a unique focus. The "Mile End" neighborhood is home to many artists and filmmakers. Little Portugal, Little Italy, Chinatown, Greektown, and Gay Village all have identities grounded in particular communities. Old Montreal and Downtown Montreal retain the historical features and flavor of an old town, but offer the amenities of a modern world city.

Montreal should be of particular interest to Esperanto-speakers as the site of one of the most ambitious language planning programs in recent history. In the late 60s and early 70s, Montreal recognized that English was putting increasing pressure on French and threatening to change the character of the city. Through a series of legislative and educational initiatives, an effort was made to preserve Montreal's French character. It's worth experiencing it first hand.

Each year, Esperanto-USA chooses a location to meet and share our experiences as members of the Esperanto community. In addition to the meetings necessary to choose officers and conduct organizational business, we generally have a variety of cultural and intellectual offerings, too.

This year we're meeting together with the *Tut-Amerika Kongreso*. The Esperanto community in each country has a different character. This is a tremendous opportunity to meet activists from different parts of our hemisphere and to begin thinking about how we can work more effectively together.

It's an exciting time to be involved with Esperanto. There has never been a time with more interest and excitement about learning the language and participating in a global community. Esperanto is on the agenda more so than ever before. Get involved!

I hope you'll join us for the *Landa Kongreso* and *Tut-Amerika Kongreso* in Montreal this year. They promise to be some of the most exciting and international congresses in memory. If you missed Tijuana last year, you don't want to miss Montreal this year. If you go to only one Esperanto event in 2008, make it this one. ★

Mistakeks

When I was in college I let myself be talked into jumping directly into an upper level course in conversational French. Once I realized that everyone else in the class was much more fluent, I barely spoke at all for fear of making embarrassing mistakes.

But then some years after college I met someone who was learning French, and he and I had no trouble carrying on a limited conversation in French (with some English and a fair number of hand gestures mixed in). I'm sure a real French speaker would have been horrified, but we had a grand time and managed to communicate pretty well.

Many years later at an Esperanto kongreso I met someone who'd taken up the language fairly recently and who spoke with clarity and confidence despite almost completely ignoring the accusative. I'm sure he knew he was committing grammatical errors, but he didn't let that get in the way of communicating what he had to say.

The moral of all this is that fear of mistakes gets in the way of learning and speaking, and this is an important point to keep in mind when teaching (or learning) a language.

An older school of language instruction demanded good pronunciation, grammar, and usage right from the start, on the theory that this saved having to un-learn bad habits later. Today the emphasis has shifted toward the ability to communicate, since that's a more urgent real-world need, and experience has shown that those supposed bad habits aren't so hard to shake after all.

In fact, the confident but ungrammatical Esperanto speaker I mentioned earlier now uses the accusative perfectly.

Esperanto is often self-taught or learned with a group of friends (which is incidentally one reason I decided to

write this column in English). This has its disadvantages, but it may often have an unrecognized advantage: It makes it less likely that we'll be afraid of making mistakes for the same reason that people sing with more confidence in the shower or in a karaoke bar.

But some lingering nervousness may still be a problem for many of us, and anyone teaching a more formal class needs to keep in mind the need to help students get over their fear of making mistakes. One of the oldest classroom techniques for accomplishing this, especially when teaching beginners or large groups, is to let students respond en masse.

Andreo CSEH, possibly the most successful Esperanto teacher who ever lived, made excellent use of this. Even people too shy to go to a karaoke bar will usually join in on a group sing.

It also builds confidence when students learn they don't have to be perfect and that a mistake won't result in instant, personalized criticism.

Having said all that, I don't want to give the impression that I think students or teachers should simply ignore grammar, usage, and pronunciation and settle instead for a sort of "Min Tarzan" dialect of Esperanto. The ability to communicate may be more important, but that doesn't mean everything else has no importance. But a better way to deal with errors, rather than calling a lot of attention to them, might be simply to emphasize what to say instead.

For example, one of the most commonly misused words in Esperanto, at least among English-speakers, is the preposition *po*, which has no exact equivalent in English. Since the English preposition "per" similarly has no exact equivalent in Esperanto and both start with a P, confusion is probably inevitable. Even experienced and knowledgeable Esperanto-speakers will occasionally talk of a car traveling "*je 60 mejloj po*



D. Gary GRADY

Gary is Vice President of the American Association of Teachers of Esperanto (AATE). He lives in Durham, NC.

dgary@mindspring.com

horo" or a hotel room costing "100 dolarojn po nokto."

It isn't sufficient to point out that this is a mistake, since that leaves unanswered questions: If *po* doesn't mean "per," then what does it mean? And how do you translate "per" into Esperanto? Examples are likely to be clearer than abstract definitions. For instance:

"She drove 60 miles per hour" can be translated *Ŝi veturis 60 mejlojn hore* or *Ŝi veturis po 60 mejloj en horo*.

"The hotel room costs \$100 per night" is equivalent to *La hotelĉambro kostas 100 dolarojn nokte*.

Mi donis al ili po du pomoj means "I gave them two apples each." (Very often *po* ____ can be translated "____ each" or "____ apiece".)

It's also useful to have the students invent their own examples.

☆

(The above is loosely adapted from an article I wrote for the *Bulteno de Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto* (AAIE), which reminds me that in a previous attempt to correct an error about the cost of membership I introduced another one, so here—I hope!—is the correct information: A calendar year's membership in both *Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto* and *Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj* costs just \$20, including two quarterly magazines (*Bulteno de AAIE* and *Internacia Pedagogia Revuo*) delivered via the Internet as PDF files, which can be read on the screen or easily printed out on paper. If you prefer to receive the magazines via regular mail, the cost is \$40. ★

E-USA Investment Funds, part II

The Investment Fund of Esperanto-USA was originally started with large donations by John MASSEY and the estate of Ella GIBSON. The principal was not available for use without a direct vote by the Board. In 1991, the Board voted to split the fund into its two components, The Gibson Fund and the Massey Fund.

Over the years a number of funds have been added. The Investment Committee manages all the investments held by a broker. Interest earned from these investments is allocated quarterly to each of the funds proportionally. Currently D. Gary GRADY heads the Investment Committee.

Unrestricted funds

In the past, ELNA used some of the funds from the **Gibson Fund** for operational expenses, currently leaving \$24,894 in this fund. Any interest earned by the Gibson fund is placed into the General Fund, thus making it available for current expenses.

The **H.E. Reed Education Fund** consists of quarterly receipts from the estate of H.E. REED. The capital is held in the form of a Trust, with ELNA as sole Trustee. Income is

used by Esperanto-USA towards various expenses of promoting Esperanto through Education. This use of the funds is shown on the Investments statement as a transfer to the General Fund. Esperanto-USA Commissioner for Wills and Gifting, William R. HARMON, is responsible for administration of the Trust.

The **Life Membership Fund** consists of the income received from everyone who contributed toward a life membership (currently at \$800). Each year an allocation is made to annual dues as an amortization of the life memberships outstanding.

The **Glenny Fund** was established to place copies of the Richardson Book into libraries. No guidelines have been established for the use of the fund, therefore the fund will continue to grow until such guidelines are established. The Esperanto Library Committee is currently headed by Orlando RAOLA.

The **Publishing Fund** was established to finance publishing projects of Esperanto-USA. Each year 50% of the profits from the sale of these books is allocated back into this fund for future publishing projects. Tim WESTOVER currently heads the Publishing Committee.

Anna BENNETT

Anna is Treasurer of Esperanto-USA. She lives with her husband Larry in Boise, Idaho.

annabennett@yahoo.com



Donations are welcome to the Gibson Fund, the Glenny Fund, and the Publishing Fund for their respective purposes. Life membership contributions can be made at any time and, as the name implies, carry with them the benefits of life membership in Esperanto-USA.

Other funds

The **Hester Renfro Wood Fund** was created by Margaret ZARCHY to honor her mother. The interest from this fund was used for scholarships to help worthy students attend the SFSU summer Esperanto courses. This fund was closed in 2000 and the money transferred by the request of Margaret ZARCHY.

The **History Fund** was initiated by Gigi HARABAGIU to eventually produce a book on the U.S. Esperanto movement. This book was produced in 2002 and all the money was used for the publishing costs.

The next article will explain the remaining funds. ★



Robert L. READ

Robert is a Board Member of Esperanto-USA and heads the Publicity Committee. He lives in Austin, Texas.

read@robertlread.net

In calendar year 2006, the committee purchased for \$300 an ad at a popular website, Boing-Boing, promoting *Esperanto Blogfest* on December 15, 2006. This was a great success, with 60 participants. Unfortunately, we did not put the same level of effort into the 2007 event (despite proddings from international participants who wanted to participate again). The result was an embarrassing lack of participation.

Hoss FIROOZANIA created an attractive ad which we placed in *The American Prospect* at a cost of \$540. Unfortunately, we were not able to measure any great response.

Advertising Esperanto in 2007

At the annual meeting in Tijuana, Mexico, a budget of \$4,000 was approved to purchase ads for various kinds directly advertising Esperanto. This is the first time in many years that we have tried to do this.

I requested help in designing a physical layout for the ad as attractive as the previous one that Hoss prepared. Since this is a different audience, we should have a different approach. The attempt to design a new ad generated significant discussions in my blog. See: <http://esperanto-usa.org/en/node/987>

I propose that we purchase an ad in *Language)*, a magazine aimed at language instruction professionals. Although there are many points for and against this approach, it remains our plan.

Unfortunately, I still need a skilled volunteer to design the ad copy. I am personally aesthetically impaired, and if I were to design the ad myself, it would simply be wasting E-USA's money.

I repeat my plea for someone semi-skilled in graphic design, ad copy, and producing PDFs to please, please, design an attractive ad based on the comments and discussion in my blog. Esperanto-USA will pay \$200 for this service if satisfactorily performed.

I intend to resign as the head of this committee at the annual meeting in Montreal. It would be a great service to Esperanto-USA if an energetic, skillful volunteer would head the committee and effectively create an ad campaign to directly promote Esperanto. ★

Jar-raporto de la Sekretario

La jaro 2007 estis iuspece bona por Esperanto-USA, iuspece ne tiel bona. La bona novaĵo estis, ke finance la organizo estas forta kaj la buĝeto estas en ekvilibro. La landa kongreso en Tiĥuano, Meksiko, dum la fina semajnfino de Julio sukcesis: ĉirkaŭ 100 personoj partoprenis, inkluzive proksimume kvinono el Meksiko: vere internacia kunveno por la internacia lingvo. Post jaroj-daŭra diskuto, laŭ voĉdono de la membraro, la uz-nomo de la landa organizo ŝanĝis el *Esperanto-Ligo de Nord-Ameriko* (ELNA) al *Esperanto-USA*.

La Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK) en la unua jaro ĉe nova loko, Universitato de Kalifornio ĉe San-Diego, gastigis entuziasman grupon, kiuj amis la novan terenon kaj la bonan instruon, kaj komprenable la mirindan etoson de internacia amikeco. Cetere, antaŭ ol la fino de la jaro, dank' al la dediĉita laboro de Vilĉjo HARMON kaj Vilĉjo HARRIS, nova loko estis trovita por la Centra Oficejo, proksima al la tiama loko, kaj dum Januaro 2008 Vilĉjo HARRIS, helpe de kelkaj volontuloj, translokigis la stokon da libroj, komputilojn, kaj la multajn aliajn aĵojn,



Julie SPICKLER

Julie estas Sekretario de Esperanto-USA. Ŝi loĝas en Menlo Park, Kalifornio.

pjspickler@aol.com

kiuj estas bezonataj por la tagaj oficejaj aferoj.

La ne-tiel-bona novaĵo estis, ke la nombro de membroj de Esperanto-USA malgrandiĝis: je la fino de la jaro estis 592, inkluzive de dumvivaj membroj. Laŭ la statistikoj de la Centra Oficejo, multaj enketoj okazas dum ĉiu monato, sed ŝajnas ke malmultaj komprenas la valoron de membreco en la organizo. ★

Hazarda Esperanto

(sur publikaj sap-ujoj)



H. FIROOZNIJA



Christopher ZERVIC

Ĉu vi sanis antaŭe, sed ne plu? Nu, laviĝu.
Gojo estas puraj manoj...

La alilanda konversacio

Dediĉita al Mar CÁRDENAS, brila pontofaristino

Vidis mi ĉe lasta Kongreso de E-USA, aŭkcie, junan virinon gajnantan gravan libron de Julio BAGHY. Scivolis mi pri ĉi tiu leganto.

Keneĉjo GOLDBERGO

Keneĉjo estas membro de Esperanto-USA. Li loĝas en Los-Anĝeleso, Kalifornio.



Post la nutraĵo, proponoj, restis ĉe nur iu tablo tri.

La rondon babilantan de Mallely, la librogajninto, Morayma kaj Miguel, ĉiuj el Tecámac (35 kilometrojn nordoriente de la centro de Meksikurbo, do 2,250 kilometrojn sudoriente, rektlinie, de nia tablo en Tiĥuano), mi kvarigis.

Iu rondano, komencinte lernadon de nia komuna lingvo antaŭ du monatoj, estis baldaŭ ekzameniĝota!

Mallely MARTÍNEZ-MATOS parolis al Miguel GARCÍA-GARCÍA gramatike. Jen la instruistino! Mi bone memoras la ridetojn de kaj Miguel, tiu, laŭ li, amanto de Esperanto, kaj Morayma MARTÍNEZ-MATOS, fratino de Mallely.

Pri lingvouzado parolis ni komforte en nia lingvo verda, en lando ilia, unua tia sperto mia.

Esperata de la nuna skribanto estas, ke tiaj konversacioj floros trans ankoraŭ alia landlimo, ja samlingve, ĉi-somere en Montrealo. ★

Leteroĵ

Kondolencoj

Kun granda malĝojo ni sciiĝis pri forpaso de Donald J. HARLOW. Lia morto estas grandega perdo por la internacia Esperanto-movado. En Ĉinuĵo troviĝas multe da liaj E-amikoj kaj tiuj, kiuj legas liajn verkojn kaj librojn en la pasintaj jaroj. Ni, ĉinaj esperantistoj, ĉiam sopiras lin.

Eternan pacon al s-ro Donald J. HARLOW,
—Ĉina Esperanto-Ligo

Pensulo bele universala

Ĉe iu konferenco apud Don nova amiko mia sidigis min. Do revo mia efektiviĝis! Bele parolis ni ĝis la momento kiam ekrimarkis Don, "Vi havas malbonan akĉenton!" Mi fortunis min, dirante "aĉa, aĉa, aĉa."

Returniĝinte, mi vidis, aŭdis Don ridanta!

Alikonferente, lingvistike estis diskutata la vorto "blankulo." El sia libroserva seĝo iomete disaranĝis Don la hararon, eksplikante, ke ni ĉiuj estos blankuloj.

Don HARLOW estis unua mia redaktoro nialingve.

Decidis li eldoni literaturan numeron de bulteno nia. Lastmomente aldonis mi sesvortan poemon al mia planita, unupoema propono. Mi timis laŭ kutime.

Aperigis Don tiun mallongan poemon antaŭ sia antaŭparola eseo.

Respondis mi:

Estimata Redaktoro mia!

Dankon pro la kuraĝigo, kiu entenas la mondon.

—Keneĉjo GOLDBERGO

Senintenca senlandigo

Estimata Samideano DE KOCK,

Hodiaŭ alvenis la lastatempa numero de *Esperanto-USA* (2007/5-6), sur paĝo 5 de kiu aperas via letero pri mia recenzo de *Beletra Almanako I*.

La tri menciitaj usonanoj estis homoj kiujn mi sufiĉe bone konas por scii, ke ili estas usonanoj. Bedaŭrinde vin mi ne persone konas, do neniel mi povus scii, ke vi civitaniĝis en Usono. Tial vi ne estis menciita. Vi diris "La preterlaso de ia mencio pri mia nova statuso sugestas, almenaŭ por mi, ke mi nun fariĝis homo senlanda..." Manko de via nomo en mia listigo ne povas depreni de vi vian

civitanecon en Usono, memevidente. Same vi ne povas "senlandiĝi" per ia skribita manko de rekono de via civitaneco.

Mi bedaŭras, ke mia recenzo tiel malfeliĉigis vin. Ĝi tute ne estis pretervido; mi simple ne sciis, ke vi estiĝis civitano de Usono. Kiel mi povus scii tion?

Mi almetu mian opinion pri la vortoj kiujn vi raportas, diritaj de iu ĵurnalisto en via regiono, ke oni devas esti naskita en Usono almenaŭ antaŭ kvin generacioj por esti usonano. Nu, vi bezonas pli inteligentajn ĵurnalistojn en via regiono, verŝajne. Tia sinteno similas al sinteno kontraŭ homoj kiuj ne havas "blankan" haŭton. Mi persone ignoras ilin. Mi sugestas, ke vi same faru.

Amike,

—William R. HARMON

The importance of poetry



Timothy TIKKER

Thank you for such an interesting special issue of the *Esperanto-USA* (2007/5-6). I especially appreciated the biographical sketch "Zamenhof Lazaro Ludoviko" by G. WARINGHIEN.

Besides its relating many details of Zamenhof's life that I had not previously known, I found that, in its description of Zamenhof's monumental efforts to develop a solid literary basis for the language, both original and translated, it convinced me all the more of a theory I have about why he made certain choices in determining Esperanto's grammar.

Our language has two notorious complications: the accusative case, and the agreement of nouns and adjectives in case and number. Many critics of Esperanto have centered their attacks on these complications, claiming that they are unnecessary, and that their aims could be accomplished more easily by other means, e.g. simple word order. Usually, Esperantists have explained that these grammatical traits were intended to allow flexibility of word order, to make the language more accessible to the greatest variety of people from differing linguistic backgrounds.

However, I believe that there was an even more important reason for these choices: flexibility of word order for the sake of poetic expression, both original and

translated. Knowing the great Slavic love for poetry, and seeing how already, in the first publication of *Lingvo Internacia*, Zamenhof included both original and translated verse, it is clear that Esperanto's suitability for poetry was of vital importance to him.

I have come to believe that this is actually a key reason why Esperanto has succeeded to the extent it has, surpassing any other artificial language: its development was not one-sided, i.e. concerned only with business, science or political communication; rather, from the start the language was conceived with a strong artistic element. The fact that Zamenhof worked so hard to prove that "Esperanto can serve as a language for the free expression of all the works of genius of mankind's literature" and "our language ought to serve not just for documents and contracts, but for life,"¹ proves that he understood how an international language must be able to express itself just as well artistically as practically.

I contrast this with the attitude expressed around certain other artificial languages. Lancelot HOGBEN, in his draft for Interglossa², focused largely on the need for his international language to be suitable for scientific communication. Significantly, all of his sample translated texts are prose (the possible exception is the inclusion of the 23rd Psalm, which arguably is a poem; yet here it's translated in a purely prose manner)³. The developers of Interglossa's successor, Glosa, have even expressed disdain for the consideration of poetry:

"Fortunately, Glosa was born out of the mind of Prof. Hogben, a linguist but, also a scientist; and he lived brilliantly in the real universe; which is much more interesting and colorful than some literary world of words.

"He, a scientist, discovered his poetry in the real universe. Somebody threw at me Wordsworth's poem 'I wandered lonely as a cloud...'

"Yes, I agree, it's beautiful! But a poet sees only a small piece of the real universe; a scientist is able to enjoy infinitely more beauty in any flower.

GLOSA IS THE LANGUAGE OF SCIENCE. IT IS PURE COMMUNICATION."⁴

A major focus of the artificial language Interlingua was its potential for scientific publications. Years ago, while researching artificial languages at a university library, I

(continued on page 8)

Poetry (continued from page 7)

found that one of their few items in Interlingua was indeed an old collection of scientific papers. It clearly hadn't been looked at in many years (if at all). Now I more fully appreciate just what Zamenhof accomplished with his determined and continual effort to produce a substantial body of Esperanto literature. Scientific papers often go out of date in just a few years in the light of new research. Great literature, however, both prose and poetry, never goes out of date. Thus Zamenhof made a lasting contribution to the permanence of his language. And while scientific publications are certainly important, focussing on them primarily is ultimately self-defeating in terms of establishing a lasting basis for a language, as so much of the material soon becomes obsolete.

Any language plan that does not allow for artistic expression to be important alongside scientific is incomplete. Zamenhof, trained as a medical doctor, certainly was enough of a scientist to know what was required of a language suitable for scientific communication. Fortunately, he was also a poet, and I'm now more convinced than ever that this was key in his ability to develop a complete and truly successful international language.

1. Quoted in G. WARINGHIEN, "Zamenhof Lazaro Ludoviko," *Esperanto-USA*, 2007/5-6, p. 21.
2. Lancelot HOGBEN, *Interglossa: a Draft of an Auxiliary for a Democratic World Order, Being an Attempt to Apply Semantic Principles to Language Design*, Harmondsworth/New York, Penguin Books, 1943.
3. Hogben, op. cit., pp. 242-248.
4. "Boni-fortuna, Glosa pa gene nati ex enkefa de Prof. Hogben, u linguisti sed, plus, u sciencisti; e an pa vive fo-hedo in reali kosmo; qi es mega ma interese e kroma-ple de u literari lexi-munda. An, u sciencisti, pa eureka an poesi in reali kosmo. Uno-pe pa bali a mi Wordsworth poem "I wandered lonely as a cloud..."
Ja, mi akorda, kali! Sed u poeta vide solo u mikro mero de reali kosmo; u sciencisti pote fru infinita ma plu kali in u-la flori.
GLOSA ES U LINGUA DE SKIENCE. ID ES PURI KOMUNIKA.
Ronald CLARK & Wendy ASHBY, "Glosa—puri komunika," *Plu Glosa Nota*, No. 75, January/February 1996; available online at <<http://www.glosa.org/en/gtecte.htm>>. This webpage also includes Glosa translations of Shakespeare *Sonnet 18*; significantly, it is not a poetic translation. Ironically, this page also has a Glosa translation of Zamenhof's *La Espero*, which, however, is still not rendered poetically!

—Timothy TIKKER, Ann Arbor MI

Forpasoj

James Henry PARKS



Forpasis James Henry PARKS pro kancero la 31-an de Marto 2008 en Bellevue, Vaŝingtonio. Lia aĝo estis 58 jaroj.

James estis membro de UEA dum 1990 kaj membro de Esperanto-USA dum 2003-2007. Li estis majstro-ĉarpentisto kaj lignaj-artisto, kuiristo, pastro en la *Universal Life Church* kaj longtempa membro de la *Northwest Regional Esperanto Club*. Por honoro la memoron al li, oni donacu al la *American Cancer Society*

www.cancer.org aŭ al la *Puget Sound Blood Center*, www.psbcc.org.

(Ĉerpita/tradukita el la *Seattle Times*)

Margot H. GERSON

Forpasis Margot H. GERSON en Novjorko la 13-an de Marto 2008. Ŝia aĝo estis 88 jaroj. Ŝi estis dumviva membro de UEA, kaj ŝi membriĝis ĉe E-USA dum 2002 kaj 2004.

Dum la sepdekaj kaj okdekaj jaroj, ŝi funkciigis la informcentron *Esperanto Information Center* en Novjorko kaj laboris kun s-ro Mark STARR.

(Laŭ informo de filino Claudia GERSON)

Helpopetoj

Serĉas gastigantojn

Mi estas s-ro Mramba Simba, kaj mi loĝas en malgranda vilaĝo en la norda parto de Tanzanio. Tie mi estas la estro de kvin vilaĝoj kaj ankaŭ gvidas la lokan evoluhelp-organizeton *Mazingira*.

Mi planas viziti Usonon en la venonta Oktobro 2008 por prelegi kaj peti subvenciojn por miaj projektoj al Esperantistoj de Usono. Mi mem kapablas pagi la flugbileton de Afriko al Usono kaj reen, sed mi bezonos helpon por senpaga gastigado kaj por vojaĝkostoj en Usono dum mi faras prelegojn al Esperanto-grupoj.

Mi esperas, ke vi povas kune interkonsenti pri miaj prelegoj dum 45-60 tagoj en Usono.

Varmajn salutojn, Mramba Simba
<http://www.kono.be/mazingira>

Petas fotojn, bondezirojn

Mi estas ĉina esperantisto Li Jianhua. mi laboras en *El Popola Ĉinio*.

Mi konstruas retejon por la Pekinaj Olimpikoj per Esperanto, kaj mi bezonas vian foton kaj vian bondeziron al Pekinaj Olimpikoj kaj al la sportistoj. Ĉu vi povas helpi min? Koran dankon.

<http://miamasvin.88y.net/>
bluacxielo@gmail.com

Volas korespondi

Yasuhiro Nagaoka. Yashimajutaku B-5, Mure 4-22-16, Mitaka-shi, Tokio 181-0002 Japan

41-jara komencanto, bus-ŝoforo. Mi volas korespondi kun virino el Usono (aĝo ne gravas). Mi ŝatas legi, bicikli, kaj aŭskulti muzikon (klasikan kaj jazon).

Okado Fumiko, 13-11 Nakai-mati 3 chome, Takasaki-si, Gunma-ken, 370-0852 Japan

Komencanto kiu jam aliĝis al UEA kaj la Japana Esperanta Instituto.



Kalifornianoj kunvenas(1)

MILPITAS—De la 4-a ĝis la 6-a de Aprilo, SFERO aŭspiciis la Tut-Kalifornian Esperanto-Konferencon en Milpitas, ĉe la hotelo Crowne Plaza.

Entute 29 esperantistoj partoprenis. La programoj estis senescepte tre interesaj kaj bone preparitaj, multaj kun montrado de bildoj sur ekrano.

Por tiuj kompatinduloj kiuj ne partoprenis, jen la programoj kiujn vi maltrafis. Vilĉjo HARMON komencis per omaĝo al Donald HARLOW kaj vokis almetojn de la partoprenantoj (speciale kortuŝa estis la almeto de Anjo HARLOW); Georgo BAKER prezentis supervidon de la konstruado de la nova ponto trans la golfo de San-Francisko kun multaj interesaj detaloj; Steĉjo SCHWICHOW klarigis pri Budhana meditado, sutroj, kaj mantroj, kun ekzempla praktiko.

Ed WILLIGER malnodis la komplikan tut-mondan reton pri adresoj ktp; Julie SPICKLER prezentis interesan klarigon pri urbonomoj en Kalifornio; Lusi HARMON kaptis ĉies intereson per bildoj el ŝia ĵusa vizito al Barato, la Taj Mahal kaj elefantoj kaj bovinoj en la stratoj; Henry STUDER montris multajn fotojn pri la farado kaj rikoltado de sekvinberoj, vere informplena klarigo; Gregory TSEYTIM donis informon pri la Tehnologia Muzeo, kiun iuj vizitis en San Jose post la fino de TKEK; kaj Andrea MONTICUE kaptis ĉies atenton per klarigo pri la "virtuala mondo" de *Second Life*. Alex SHLAFER prezentis "Lingvan Forumon" kun interesaj observoj pri Esperanta lingvo-uzado.

Mi povas aldoni, ke la helpo de Koto FARMER kaj David GILLETTE (muziko kaj kantoj) kaj Mar CARDENAS (ludoj) dum la Interkonatiga Vespero estis altkvalitaj kaj ĝuitaj.

—Vilĉjo HARMON

Danjela Jozefina debutas(2)

SAKRAMENTO, KALIFORNIO, la 6-an de Marto—Ni tre ĝojas anonci la naskiĝon de nia dua filino, Danjela Jozefina (angle: Danielle Josephine) SCHMIDT, kiu naskiĝis jaŭdon la 6-an de Marto. Ŝi naskiĝis hejme en la varma akvo de naskkuvo, kun sia patro Virĝiljo, granda fratino Aŭtuno (5-jara) kaj du karaj akuŝistinoj apude. Danjela naĝis en la mondon kovrita de sia amnia kufo, signo de bonŝanco en multaj kulturoj. Mi parolas Esperanton plentempe al la nova bebo (kaj ŝia granda fratino). Ni ĉiuj adoras ŝin kaj tre ĝojas ke ni havis naturan, senprobleman naskon en la privateco de nia hejmo. Ĝi estis inspira sperto por ni ĉiuj. Pezo: 7 funtojn, 2 uncojn (3 kg. 238 gr.); longo: 20 coloj (50,8 cm)

—Amanda Higley SCHMIDT

Gratulojn(3)

OLYMPIA, VAŜINGTONIO—Mary HAMMERSMITH afable sendis tiun ĉi foton de instruisto Ellen EDDY kaj lernanto Jozefo NUGENT. Jozefo ĵus ricevis atestilon pro sukcesa fino de la Enkonduka Esperanto-Kurso de E-USA. Gratulon, Jozefo! ★

Hazarda Esperanto



Snuf', snuf' ... "Do kie estas la pomoj?"

Jen ŝildo antaŭ restoracio en Roĉestro, Novjorkio. Kompreneble temas pri la itala vorto por "tomato", sed preterpasante, esperantistoj foje flaras la aeron...

Ĉe la redaktista skribotablo

Dankon pro via entuziasmo pri la nova traduk-rubriko. Ni ricevis sep tradukojn, el kiuj ses meritis legadon kaj pensadon. Unu estis ne precize en Esperanto, sed en iu reformita lingvo "Esperanto 20000". Pri ĝi ni vere scias nenion, sed ni klarigu: la celo de la rubriko estas tradukado *en Esperanton*, ne en aliajn lingvojn. Bedaŭrinde ni ne povas eĉ taksu tiun ĉi provon, do ĝi ne rolas en nia diskuto.

Ni dankas al H.F., C.E.O., S.N., G.B., R.T., kaj S.L. kiuj sendis bonajn tradukojn de la teksto:

"I knew a woman that was so dexterous with a fellow, who indeed deserved no better usage, that while he was busy with her another way, conveyed his purse with twenty guineas in it out of his fobpocket, where he had put it for fear of her, and put another purse with gilded counters in it into the room of it. After he had done he says to her, 'Now han't you picked my pocket?' She jested with him, and told him she supposed he had not much to lose; he put his hand to his fob, and with his fingers felt that his purse was there, which fully satisfied him, and so she brought off his money. And this was a trade with her; she kept a sham gold watch and a purse of counters in her pocket to be ready on all such occasions, and I doubt not practised it with success." (el *Moll Flanders* de Daniel DEFOE)

Ni diskutos ĉi tie kelkajn elektojn el la diversaj provoj, kaj finfine proponos kunmetitan "sintezan" tekston, ne kiel perfektan modelon sed kiel "bonan provon".

Defoe, kiu verkis en la fruaj jaroj de la 18-a jarcento, kutime verkis per sufiĉe longaj kaj komplikaj frazoj. Abundas subfrazoj kaj korelativoj. En la supra teksto estas nur kvar frazoj. Esperanto, kvankam ĝi kapablas konstrui tiom longajn frazojn, ne kutime uzas ilin, kaj oni facile perdiĝus en longaj vicoj de "kiu"-oj. Tamen por redoni la "guston" de la Defoe-a prozo, necesas gardi kontraŭ tro mallongaj frazoj.

dexterous: Kelkaj elektis *lerta/lerti*, kelkaj *manlerta/manlerti*. Ĉu estas aliaj taŭgaj vortoj? *kapabla*? La senco ĉi tie estas iom pli ol *lerta*; en la angla vorto estas ia nuanco de trompado, truko...

deserved no better usage: preskaŭ ĉiuj uzis formon de *trakti*.

was busy with her: *distriĝis, sin distris, sin okupis, okupiĝis*. Ĉu ne temas pri *amindumi*? Ĉu oni aŭdacus eĉ skribi *seksumi*? Certe tio estas la senco, ĉu ne?

conveyed: *forprenis, elpoŝigis, liveris, fortiris, elprenis*. La elektoj estas pli-malpli malbuntaj.

fobpocket: *horloĝpoŝeto, horloĝpoŝo, monpoŝo*. Eble nur *poŝeto* sufiĉus.

gilded counters: *oritaj ŝetonoj, orkoloraj ŝetonoj, orumitaj ŝetonoj*. Laŭ ni, tiaj ŝetonoj estus nek *oritaj* nek *orumitaj* por tia uzado. Ni preferas *orkoloraj*.

Now han't you picked my pocket? Estas malfacile redoni en Esperanto tian frazon, kiu intence esprimas apartan parolmanieron en la angla. Preskaŭ ĉiuj skribis *Ĉu vi ne priŝtelis (fingrumis, prirabis, poŝostelis)...* S.N. skribis *Nu, vi ne poŝtelis min, ĉu?* kiu laŭ ni estas pli bona provo—la gramatiko ne estas tute bona, kiel taŭgas al la originala teksto.

she jested with him: Tri elektis *ŝerci*, unu *blagi*, sed plaĉas al ni *Ŝi moke respondis*.

she brought off his money: El la diversaj provoj, trafa estis *ŝi liberigis lian monon*.

this was a trade with her: Preskaŭ ĉiuj uzis la vorton *metio*; unu elektis la vorton *negoco*. Laŭ ni, *komerco* tute eblas ĉi tie. Same *entrepreno*.

a sham gold watch: Iu skribis *falsan oran brakhorloĝon*. Ni dubas ĉu brakhorloĝo estis konata en la historia epoko de la rakonto. Anstataŭ *falsa*, plaĉas al ni *ŝajna...*

Do jen nia provo al sinteza teksto, por kiu ni libere ŝtelis el la diversaj proponoj:

"Mi konis virinon tiom lertan pri viroj, kiuj ja meritis nenian pli bonan traktadon, ke dum iu amindumis kun ŝi, ŝi manovris el lia horloĝpoŝeto (kien li kaŝis ĝin pro timo de ŝi) la monujon kun dudek gineoj. En la poŝeton ŝi enmetis duan monujon plenan de orkoloraj ŝetonoj. Post satiĝo li diris al ŝi, "Ĉu vi prenis mia mon', ĉu?" Ŝi moklude respondis, ke li ne havas "tiom da" kiel li kredas. Li palpis la poŝeton kaj konstatis ke la monujo restas, kaj tial supozis ke ĉio estas en ordo. Tiel ŝi liberigis lian monon. Jen, ĉiam pretis falsa orhorloĝo kaj monujo de ŝetonoj en ŝia poŝo por ĉia renkontiĝo, kaj mi tute ne dubas ke ŝi ĉiam praktikis tian komercon plensukcese."

Kiel venontan tradukodefion ni prezentas kelkajn frazojn el *The Life and Opinions of Tristram Shandy, Gentleman*, Vol. I, Ch. IV de la anglo Laurence STERNE (1713-1768). Sian majstroverkon Sterne aperigis popece inter 1759 kaj 1767. En la romano ne grave rolas la vivo de Tristram Shandy, nek liaj opinioj—la libro tamen



Lee MILLER

Tim WESTOVER

Ni prezentos en ĉiu dua numero de la bulteno (t.e., en numeroj 1, 3, kaj 5) tekston por via laboro. Sendu vian tradukon al la jenaj adresoj samtempe:

timwestover@yahoo.com

lamiller@centurytel.net

Leginte viajn tradukojn, ni faros resumon de la plej bonaj provoj kaj sukcesoj, kune kun komentoj kaj reagoj pri kelkaj malpli sukcesaj rezultoj.

Ni petas, ke vi sendu **nur unu tradukon**, ne plurajn diversajn provojn. Traduku, kaj sendu al ni rezulton kiu laŭ vi estas via plej bona provo.

La limdato por ricevo de via traduko estas la 15-a de Julio.

sekvas diversajn aventurojn de la parencoj de Tristram, ofte flankenirante dum paĝoj por kromrakontoj, amuzaĵoj, desegnaĵoj, blankaj kaj nigraj paĝoj, kaj netradukeblaj kaj maldecaj vortludoj. Unu el la plej gravaj temoj estas verkado kaj libroj mem—tial *Tristram Shandy* estas taksata unu el la plej fruaj "meta"-romanoj, kiuj poste inspiris Joyce, Nabokov, Borges, kaj aliaj modernistoj. Jen la tradukenda teksto:


"I have undertaken, you see, to write not only my life, but my opinions also; hoping and expecting that your knowledge of my character, and of what kind of mortal I am, by the one, would give you a better relish of the other: As you proceed further with me, the slight acquaintance, which is now beginning betwixt us, will grow into familiarity; and that, unless one of us is at fault, will terminate in friendship—*O diem praeclarum!*—then nothing which has touched me will be thought trifling in its nature, or tedious in its telling." ★

Krucvort-enigmoj de niaj legantoj

Ĉi-numere la konkurso-sinsekvo paŭzas por ke ni dividu kun vi kelkajn enigmojn de niaj legantoj. (Kaj ĉar ni **ne** konkurso, bonvolu **ne** sendi al la redakcio viajn solvojn!) En la sekva numero aperos la ĝustaj solvoj kaj nova konkurso. Ĝuu la enigmojn!

Horizontale

- 1 Veturilo por grandaj pezaj skatoloj
- 6 Kokofrukt'
- 8 Priskribo por cereala greno
- 10 Populara azia grajn'
- 11 Samspeca bestar' trovita en Afriko
- 14 Proponita prepozicio pri akuzativeco
- 15 Konjunkcio pri sekveco
- 16 Ĉirkaŭa ekstremaj'
- 17 Sufikso pri pli-malpli daŭra ago
- 18 Forta kuirherbo
- 19 "Jen la _____."
- 21 "Tiuj ne estas miaj, sed _____."
- 24 Bestoj kiuj loĝas en Kanado
- 27 Sufikso pri inklino
- 28 Ili troviĝas en publika vestolavejo



Enigmo kompleze de Dave RUTAN

Vertikale

- 1 Granda Fest' antaŭ Cindromerkredo
- 2 Teme pri flugveturilo
- 3 Lok' inter du lokoj
- 4 Malvir'
- 5 Akvolokoj en dezerto
- 7 Plantkoloraj
- 9 Priskribo de geedziga ringo
- 12 Superokula harar'
- 13 Membr'
- 15 Prepozicio pri kvanto
- 20 Pura, trinkebla likvaj'
- 22 Kien perditaj ŝtrumpetoj iras en la sekigilo
- 23 Forta sento inter homoj
- 25 Unu' de elektra rezistanco
- 26 Emfaza vorto

Ĉe Samovaro

*Ĉe malnova samovaro
sidas ruso kaj hungaro.
Dum la akvo zume bolas
la amikoj ekparolas:*

*La hungaro ne respondas,
liaj pensoj ĝeme ondas,
viŝas larmon retenitan:
"Havi landon, sed perditan."*

*"Havi landon en libero,
tamen migri tra la tero
iri vojon, sed sencelan...
Ĉu vi konas pli kruelan?"*

*Ĉe malnova samovaro
sidas ruso kaj hungaro.
Dum la akvo bolas zume
ili ploras, ploras kune.*

—Julio BAGHY, 1926

Horizontale

- 1 Kiel dueto ludas
- 3 Komprenas aŭ sentas pri io
- 7 Nia planedo
- 8 Restas seĝe
- 9 Kiel sonas fluganta muŝo
- 11 Sala guto
- 13 Krueleto
- 14 Rusa teujo; kolekto da inaj ĉeloj?
- 15 Inter komenco kaj fino
- 17 Bonaj konatuloj
- 21 Leo TOLSTOY
- 23 Posedi
- 24 Reagas al demando
- 26 Strato aŭ pado
- 27 Ne barita, ne sklava

- 28 Mankas trafinda objekto
- 29 Esprimas malĝoje
- 30 Movanta likvaĵo

Vertikale


- 2 Komencas diri
- 4 Ege ĝena
- 5 Forlasi lokon por nova loko
- 6 Julio BAGHY
- 7 Havis kaj ne ellasis
- 10 Havis kaj lasis
- 11 Patrujo
- 12 Kio malsoifas
- 16 Antikva
- 18 Malproksimiĝi
- 19 Malgraŭ tio; sed
- 20 Forigas per tuko
- 22 Varmegas ĝis vaporo
- 25 Rezonajo, produkto de l' menso

Solvo de la krucenigmo el 2008/2:




Gratulojn al **Sali LAWTON** kaj **Cornelius McKOWN**, kiuj ambaŭ gajnis la lotumadon! Ni kore dankas kaj kuraĝigas niajn aliajn ludantojn: R. THIBAUT, B. HARMON, A. VICTOR, D. RUTAN, K. GOLDBERGO, D. EVANS, G. BAKER, P. MCCORQUODALE, L. GRAVES kaj J. STRICKLAND. Bis!

Enigmo kompleze de E. James LIEBERMAN



Ĉu vi povas trovi la ringon perditan?



Antaŭ nelonge aperis surrete nova ludo pri "alternativa realo" en kiu Esperanto ludas gravan rolon.

Ĝi komenciĝis per filmeto aperinta ĉe la retejo findthelostring.com, en kiŭ junulino suferanta de amnezio vekigis en sudafrika maiz-labirinto kun

mistera tatujaĵo sur la brako: "Trovu la ringon perditan."

Post pluaj esploroj fare de multaj ludantoj, iom post iom elvolviĝas 27-ĉapitra "kodekso" kun pliaj enigmoj—ĉiuj tute en Esperanto!

La ludon, kiu interplektiĝas kun la

historio de la Olimpiko, kreis fama ludverkisto Jane MCGONIGAL kun subteno de la Internacia Olimpika Komitato kaj la firmaego McDonalds. La lŭdado daŭros ĝis Aŭgusto, kiam komenciĝos la Olimpiko en Pekino.

Plia informo: esperanto-usa.org